EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

**ENHAVO 10 > • ZPI • Kursoj por azianoj • UN • Norvegio • Universitatoj < feb. 13**

# ZPI – informoj, kvizo kaj alvoko

La labor-grupo "zorgantoj pri informado" de UEA estis starigita en la tempo de la estrarano Emilio Cid kaj daŭrigita nun sub la gvido de la nuna estrarano pri informado, So Jinsu. Ĝi funkcias pere de mesaĝa listo en Google:

https://groups.google.com/g/zorgantoj-pri-informado .

Partoprenas en ĝi Emilio Cid, Andreas Diemel, Mariana Evlogieva, Chen Ji, Aleks Kadar, Zsofia Korody, François Lo Jacomo, Stefan MacGill, Martin Schaeffer kaj Lu Wunsch-Rolshoven.

Ni produktas informilojn. La bazaj informiloj en pluraj lingvaj versioj estas videblaj kaj elŝuteblaj en https://uea.org/teko/varbiloj.

Afiŝoj pri pluraj festendaj tagoj estas videblaj en https://espereto.com/informiloj/.

Aldone al tio ni funkciigas alian liston por reprezentantoj de landaj asocioj, tra kiu fluas la komunikoj de UEA por apartaj okazoj destinitaj esti tradukitaj al naciaj lingvoj kaj senditaj al nacilingvaj informkanaloj. Kvankam la reprezentantoj de landaj asocioj estas dudeko, tamen la informa servo al neesperantistaj komunikiloj funkcias glate nur en kelkaj landoj. Ni tenas vivanta la ideon, ke varbado de neesperantistoj estas la plej grava kaj plej esenca tasko por asocio.

ZPI markas kvar konstantajn datrevenojn, por kiuj ĝi produktas afiŝojn destinitajn por tradukado al multaj naciaj lingvoj por uzo en enlandaj kampanjoj kaj kun la gazetaro. La EKO-komunikoj ĉiam raportas pri tiuj afiŝoj. Jen la kvar regulaj datrevenoj:

- Tago de gepatraj lingvoj (februaro)
- Esperanto-tago (julio)
- Tago de eŭropaj lingvoj (septembro)
- Zamenhofa tago (decembro)

Grupa listo ekzistas, kun 74 membroj ĉe: https://groups.io/g/informa-reto-pri-Esperanto. Proks. 30 landoj estas reprezentataj, aparte aktivaj en ĉi tiu kampo estas la ĉina landa asocio en Azio, la itala, germana, hispana kaj litova en Eŭropo, sed bedaŭrinde ankoraŭ neniu en aliaj kontinentoj. Membriĝo en la listo estas malferma al ĉiu; la donita retpaĝo donis klarigojn kiel peti tion.

Renato Corsetti

# ZPI: La Kvizo

Jen la kvizo. Ĉiuj respondoj bonvenaj! Montru viajn superlativajn movadajn konojn!

1. ***Kiu diris: "… ni zipus kaj malzipus nin per la inventaĵo de Zamenhof"?***
2. ***Kiu estis la kunteksto por tiu diro?***
3. ***En kiu lando kaj renkontiĝo ĝi okazis?***
4. ***En kiu jaro kaj monato okazis la diro?***

Sendu viajn respondojn al la redaktanto de la EKO-komunikoj. Ni donos respondojn aŭ mal-respondojn en la sekva EKO-komuniko.

Danke al Luis Obando aperis pluraj el la afiŝoj en naciaj lingvoj ĉi tie: https://espereto.com/informiloj/

tradukintoj bonvolu informi pri eventualaj eraroj pere de https://www.uea.org/teko/varbiloj

## Kursoj por lingvo niveloj B2 kaj C1

La Esperanto-Kursaro Tibor Sekelj anoncas novan kurson de Esperanto je la nivelo B2 de KER por azianoj. Ĉiu-sabate ekde la 19-a de februaro 2022 ekde 12:30 laŭ la horo UTC = 21: PM en Tokyo.
Gvidas Renato Corsetti.

La Esperanto-Kursaro Tibor Sekelj anoncas novan kurson de Esperanto je la nivelo C1 de KER por azianoj. Ĉiu-sabate ekde la 5-a de februaro 2022 ekde 08:00 laŭ la horo UTC: kaj 17:00 en Tokio.

**Aliĝu por ambaŭ kursoj per mesaĝo al irlei@espero.ir**

Ambaŭ kursoj povos helpi en la rekreskigo de la juna membraro de UEA!



## UN raportas por la komenco de 2022

UN n-ro 56. Klaku la ligilon por aliri la komunikon:

### Numero 56 – januaro-februaro 2022

- 10 decembro – Homrajta Tago 2021: UEA substrekis sian historion
- Unua informkunveno de la Komitato pri Lingvo kaj Lingvoj
- UEA reelektiĝis al la estraro de CoNGO
- UEA observis la Mondan Tagon de Infanoj
- UEA kunordigas projekton pri daŭripovo kaj transporto

# Kurso por norvegoj

Bona novaĵo: ĵus alvenis de Kjell Peder Hoff. la 16-an de februaro komenciĝos reta kurso en *Zoom* en la norvega. instruas Marianne Lund. La nombro de landoj sen retaj kursoj malpliiĝas. Kontaktu min (Renato Corsetti) se vi volas "semi kaj semi".

# Poema kaj mikronovela kontribuoj

Valentin Melnikov recitas siajn poemojn "Nokta gasto " kaj "Ne eterne nin sort' favoras", por la "Galerio de gepoetoj".

https://youtu.be/sdjMCAHzllM

### Homlupo en mikronovelo

Miguel Fernández legas la mikronovelon "Homlupo" de Laure Patas d' Illiers.
Tiu mikronovelo ricevis la unuan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA 2018
https://youtu.be/h5wD_UeRedI

ambaŭ mga

# Deklaro de la Afrika Komisiono

Okazis la Monda Tago de la Afrika kaj Afrikdevena Kulturo fine de januaro 2022. La Afrika Komisiono de UEA eldonis pro tio deklaron, kies versio en Esperanto estas alkroĉita. La dokumento havas tradukojn en la angla, franca kaj svahila.

# Kongo DR daŭre bobelas je agado

La prezidanto de la kongolanda asocio faris tre brilan prelegon en *Zoom* por la kluboj de Londono kaj Antverpeno. La dokumento, kiun li prezentis, meritas esti konata de aliaj afrikaj kaj tramondaj esperantistoj.
https://youtu.be/h0PtoPImKwE

RC

# Universitataj Meditoj – eburturaj esploroj

Jen la registraĵo de la lasta kunpens(ig)ado:

Temo: Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj

https://us02web.zoom.us/rec/share/7-jdFtk6SV6eZM8gzJKQ5q9Sxc1Ei-rkH1hOTiicpdzoNQMivbFdDBcbtST34BRb.YhPiVcqrgIXV5Yj3

Ahmad Mamduhi

# Irana Universitato pri turismo

La dua retinariaro pri "Esperanto kaj Turismo" en la Universitato de Tehrano okazos dum tri semajnoj ekde ĉi tiu semajno jene: La du restantaj sesioj okazos en ĵaŭdoj la 17a kaj la 24a.   Se vi akceptas prelegi kadre de ili, bv. diri:

- Kiu-tage kaj kiu-hore por vi plej taŭgas, kaj
- Kio estos via preleg-titolo.
- Bv. sendi al mi ankaŭ viajn preferatan foton kun 2- aŭ 3-linia sinprezento.

Via prelego povas esti pri kio ajn rilate al Esperanto kaj/aŭ Turismo, eĉ simple pri viaj spertoj utiligi Esperanton por turismado. Nia celo estas elmontri la avantaĝojn de Esperanto por turismo.




Ni aperigas unu el la tri afiŝoj de la retinarioj pri la sama temo, sur kiuj vi povas vidi la prelegintojn kaj la preleg-titolojn. Ĉar la prelegoj interpretiĝos persen, ties tempoj duobliĝas. Fine de via prelego ankaŭ la demandoj-kaj-respondoj intertradukiĝos same. La tuta tempo por ĉiu prelego maksimume kaj ideale estu 45 minutoj.

Ahmad M.: mamduhi@gmail.com

# Reta trompo disiras – atentu!

Disiris lastatempe klare trompa mesaĝo, tamen en flua Esperanto. Ĝi invitas anoncadon de projektoj de unuopuloj (ne organizoj) por ricevi tre signifajn monsumojn. Ĝi petas bazajn informojn, sendube sekvus peto por ricevi viajn bankdetalojn. Se vi donus tiujn, atendu rapidan malplenigon de via konto! La du donitaj nomoj malantaŭ la skemo estas plene nekonataj al UEA. Disiras dua kazo en Afriko, en kiu Fejsbuka adreso estis kaperita. Mi supozas, ke esperantistoj devas ĝoji, ke eĉ malbonintenculoj trovas nian lingvon tiom uzata, ke indas provi nin trompi!

========= vortoj:  995 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.